


Gazeto *Andaluzia*

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

11-a Jarkolekto * Septembro, 1994 * N-ro 39



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado de Correos 864, 29080 Málaga.

DEPÓSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPISERVIC, c/ Panaderos, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO, José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

ENHAVO

Efika Esperantismo / 6	3
Surtere	5
Esperanto, la fantasta lingvo	6
Vortoj kun fantastulo	8
Travivaĵoj	11
Krucvortoj	13
Poezia Angulo	14
Prilingva politiko	16
Muziki Solon	19
Eksterlandano rakontas	21
Esperanto Aplikata	24
Rezolucio de Unesko	28

Kovrilo: Mijas-Costa (Málaga)

Aplikado: magia vorto, nepra realo, kolektiva zorgado.

Teorio: fundamento de ĉiu racia agado.

Du pileroj sur kiuj baziĝas nia esperanta agado.

Aplikado: kuraĝo, maklereco, tekniko, arto, interkonaj rilatoj, propagando, celoj kaj rimedoj.

Teorio: pliigo de niaj konoj kvalite kaj kvante.

Enmane, alian ekzempleron de GAZETO ANDALUZIA. Jen ŝanco por eliri el la rutino. Esperanto kaj ties aplikado plenigas la vivon de multegaj viroj kaj virinoj.



Elika Esperantismo / 6

Kiam ni propagandas la lingvon Esperanto ofte respondas, ke la lingvo Esperanto ne estas utila por ili, ke ĝi taŭgas por nenio. Tiu respondo estas embarasa, ĉar ni nur povas respondi, ke ĝi estas utila por vojaĝi, por havi amikojn eksterlande aŭ por kolekti poŝtmarkojn, ktp. Sed tio ordinare ne estas de komuna intereso. Oni preferas lerni la anglan, ĉar ĝi estas necesa por la cibernetiko, por la scienco kaj tekniko, por la internacia komercado, ktp., kaj ĝenerale por la promocio al pli grada ofico por des pli bone pergajni la vivon. Certe, ke estonte, kiam Esperanto estos pli vaste disvastigita, Esperanto ankaŭ bone servos al ni por la scienco, la tekniko, la financoj, la komercado..., sed dume, la scio de Esperanto ne anstataŭas la anglan por la materialaj aferoj de la vivo. Tamen, pripensante la aferon, ni povas diri, ke ofte aŭ preskaŭ iam la klopodado por atingi materialaĵojn aŭ profiton, se sukcesa, estas baldaŭ perceptebla, dum en la aferoj kulturaj kaj moralaj la profito plej ofte estas prokrastita al la sekvantaj generacioj. Se la kulturo kaj la moralo alportus tujan profiton, ne estus necese, ke iam ili devas esti impulsataj, eĉ sen la garantio, ke tiu klopodado estu sukcesa. Profito ne por la propra persono, sed por aliaj generacioj ne vekas ordinare klopodadon.

Generale, oni kondukas por la individua intereso sekvata de la familia, sed ne por la kolektivo kaj des pli malmulte por la estonteco. Kaj tiel prosperas la socio kaj tiele prosperas la materiala vivo, sed bedaŭrinde ne egale por iuj. Pri la kolektivo kaj pri la estonteco neniu pensas, sed la senzorga irado mem de la okazaĵoj generas sociajn stormajn eventojn, kiuj forbalaas la tutan materialan prosperon. Anstataŭ la racio, la homoj estas forportataj de pasioj, la socio ĥaosiĝas, dispartiĝas en kontraŭantajn bandojn kaj la tuta materiala prospero, nia tuta individua kaj familia bonstato perdiĝas en fajra infero de perfortaj revolucioj kaj militoj.

En nia dudeka jarcento oni spertis du mondmilitojn. La revoj pri granda perforta revolucio, kiu devis feliĉigi ĉiujn, transformiĝis en la plej mizeriga sklavigo kaj kiam ĝi disfalis kaj oni esperis movan prosperon en libereco, la realo elmontras la ruiniĝon de la kunvivado kaj eĉ en etnaj purigoj, kaj la horizonto alia fojo minace nigriĝas. Estas oportune memori, ke en la mondo ankoraŭ ekzistas sufiĉaj atombomboj por plurfoje ĝin detruiri. Sed estas la espero, ke se ne estus kiu ajn reganta frenezulo okazos nenio, forgesante, ke la mondo estas plena de frenezuloj.

La lingvo Esperanto, ĝia interna ideo, la homaranismo mem ne povas promesi tujajn materialajn avantaĝojn. La esperantismo ne estas negoco. Tiel same kiel

la kulturo kaj la moralaj valoroj, la profito estas estonta kaj kolektiva. Pro tio, tiuj valoroj, kiujn ne donas tujan kaj individuan profiton fariĝas devoj.

Kiel diras la Artikolo 29a (1) de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj: *Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco* kaj tiu Deklaracio ne pli parolas pri devoj kaj jes multe pri rajtoj, sed inter la rajtoj ĝi ne mencias la rajton pri la nerespondeco. La indiferenteco antaŭ la kolektivo kaj antaŭ la estonteco precize estas la neobservado de tiuj devoj. Ni do ne insistu pri la materialaj avantaĝoj de la lingvo Esperanto kaj la esperantismo. Ni ofertas devojn, tiujn de la artikolo 29a de la Deklaracio. Sen la plenumo de tiuj devoj ni ne fariĝas morale indaj por ĝui la homajn rajtojn, kvankam la Deklaracio diras en la unua artikolo kaj ni tiel same agnoskas: *Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj.*

Nia mondo jam estas materiale unuigita, la ekonomiaj krizoj samtempe estas tutmondaj, la afero paco kaj milito afekcias tutmonde, la ekologiaj malekvilibroj ankaŭ afekcias tutmonde, sed la spirito de la homoj ankoraŭ estas disiga. La homoj ne nur ne kapablas harmonie kunvivi tutmonde, sed eĉ ne la diversaj etnoj de kiu ajn lando en komuna Stato.

Laŭnome de progresemaĵoj reviviĝas la plej profundaj tribalismoj, kaj anstataŭ la irado al nova tutmonda civilizacio oni revas retroiri al mezepoka feŭdismo en disiga socio konstante intermilitanta. Kaj neniu pripensas pri la homarunuigo. Neniu socia kaj politika movado entreprenas tiun taskon, eĉ ni la esperantistoj, kiuj enhavas en nia himno *La Espero* mem tian gvidideon, diras nenion. Kion ni esperas kaj atendas? Ke iam la cirkonstancoj estos favoraj al ni kaj la registaroj aŭskultos nin. Kaj ni esperas kaj esperas kaj pro la historiaj eventoj ankaŭ ni riskas esti forbalaitaj kiel influa movado kaj resti nur kiel atestantoj de forpasinta idealismo. Fakte, nura ideala revo sen agado kondukas nenien. Alvenis la momento, ke ni esperantistoj starigu la flagon de la homarunuigo. Neniu alia movado, krom la esperantista havas kiel devisa *La popoloj faros en konsento - Unu grandan rondon familian*, kio estas la homarunuigo. Ni do, esperantistoj, estu hodiaŭ la unuaj por iniciati tiun laboron.

En nia tempo de civilizacia krizo, la esperantista movado devas entrepreni tiun imponan taskon ŝanĝi la nunan ĝeneralan pensmanieron por ebligi kaj enkonduki universalan civilizacion laŭ la gvidideo de *La Espero*.

Nova tutmonda civilizacio estas nedisigebla de la supernacia lingvo Esperanto kaj ties spirito la interna ideo.

(daŭrigo sur la paĝo 7)

Ŝurtute

Kvankam mi ne intencas altrudi proprajn opiniojn al ceteruloj, tute certe mi perfidus min kaj aliajn samideanojn (kiuj konsideras urĝe uzi Esperanton nealtruisme) se mi silentus. Tial, ĉi atentigojn:

- Esperanto estas publika, ne privata esprimilo.
- Neniam lingvo pluvivas daŭre kaj bonfarte sen profitcela aplikado.
- Escepte de prigramatikaj studemuloj, oni aliras al la lingvoj serĉante, preskaŭ ekskluzive, efikan rimedon gajni monon.
- Ĝis nun, apenaŭ estis uzata nia internacia lingvo en profesiaj agadoj, kvankam inter ni abundas istoj: kuracistoj, instruistoj, muzikistoj, tradukistoj, komercistoj, oficistoj...
- Esperanto nepre bezonas gejunulojn, kaj ĉi tiuj nepre bezonas kapabliĝi por perlabori panon.
- Nuntempe, por varbi gelernantoj por Esperanto ne sufiĉas la interna ideo, nek la Esperanta beletro, nek la internacia amikeco.
- Hodiaŭ estas necese pruvi ke oni gajnas monon uzante Esperanton anstataŭ alia lingvo.
- Ĉar ni mem devas *prediki* per nia propra agado kion ni postulas de la aliuloj, ni aplikadu Esperanton (rimarku *ade*) ankaŭ ekster la movado. Ni laboru senlace kaj persisteme kaj neniu rezignu se malsukcesas. Bedaŭrinde, ĝis nun, la esperantistaro elstaris *utopiece*. Hodiaŭ, kiam akra pragmatismo karakterizas nian socion, ni elstaru ankaŭ *ekonomiece*. Alilandaj samideanoj komprenis tion kaj kunlaboras en profitcela aplikado de Esperanto. En Hispanio, Andaluzia Esperanto Unuiĝo prizorgas tion per si kaj nome de HEF, kaj en 3 el la paĝaro de *Gazeto Andaluzia*, ĝi ĉiam aperigas ekskluzive anoncojn en Esperanto.

Proponoj:

Uzu Esperanton por anonci en neesperanta gazetaro vian agadon (profesian, komercan...)

Publikigu vian agadon senpage en *Gazeto Andaluzia*

Interesaj adresoj:

Andaluzia Esperanto Unuiĝo, Poŝtkesto 864, 29080 Malago, Hispanio
IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo); Franz Josef Braun,
prezidanto, Hornisgrindestr. 8, D-
77815 Bühl, Germanio

(daŭrigo sur la paĝo 9)

Esperanto. la lingvo fantasta

Esperanto, kune kun la angla, estis honora gasto ĉe FANCON 94, dudeka kongreso de la italaĵ sciencfikciuloj, okazinta fine de aprilo en Courmayeur (Aosta Valo, Italio).

La ĉefaj tiuĝenraj italaĵ eldonistoj, verkistoj, tradukistoj, desegnistoj kaj kolektistoj, sekvis kun aparta intereso la prelegon "*Esperanto, la fantasta lingvo*" prezentitan de Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz) en Esperanto kun samtempa tradukado.

En la kongreso prezentiĝis la itallingva libro *La lingua fantastica* (eldonejo Keltia, Aosta), kiu konsistas ĉefe el la italingva de dudeko da esperantaj originalaj rakontoj, de William Auld, István Nemere, Georgo Kamaĉo, Konisi Gaku, Liven Dek, Arnoldo Aguila, Csaba Finta, Higinio García, Bernard Golden, Harry Harrison, Mihail G. Kortkov kaj Pekka Virtanen. Nu, certe bela bukado el la plej interesaj sciencfikciaj noveloj aperintaj lastatempe en nia lingvo, al kiuj aldoniĝas en paralelaj tekstoj, esperanta kaj tradukita, 120 versoj el la eksterordinara verko de Abel Montagut *Poemo de Utroa*. La 310-paĝa libro, tre kompetente redaktita de Giulio Cappa, estas plenplena de bonegaj desegnoj speciale faritaj de la plej renomaj italaĵ desegnistoj, kaj malfermiĝas per entuziasma enkonduko de Harry Harrison, certe unu el la plej konataj anglalingvaj aŭtoroj de sciencfikcio, kaj, kiel sciante, bona esperantisto.

La plejmulto de la kelkcenta partoprenantaro de FANCON 94 posedas la libron, kaj eblas do aserti, ke la ĉefa celo de la eldonaĵo -t.e. sciigi al la itala ascienfikcia mondo, ke Esperanto ekzistas, vivas kaj viglas- jam estas atingita.

Tamen jen, al tiu senduba sukceso, oni devas aldoni alian ne malpli gravan fakton, tio estas ke, laŭ la vortoj de Michela Lipari (Estrarano de UEA pri Kulturo), la itala movado havas de nun je sia dispono novan tre belaspektan nacilingvan varbilon.

Kompreneble la organizantoj de la 53a Hispana Kongreso de Esperanto ne volis fordormi la okazon kaj invitis la eldoniston de la librokolekto *Sferoj*, nian samlandanon Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek), prezenti en Malago al la hispana samideanaro la prelegon, kiun li faris en FANCON 94.

Verkita por ne esperanta publiko, tamen tiu prelego ne tuŝas la jam trivitan temon *kio estas Esperanto*. Fakte, ĝi konstruiĝis en simpla maniero kun la celo altiri la atenton de la sciencfikciema aŭskultantaro de FANCON 94.

Nu, kvankam Esperanto esence rolas en la prelego, tio ne okazas rekte, sed pere de diversaj aludoj kaj la prezentado de pluraj faktoj, multfoje ne

konataj de la ĝenerala publiko, kaj foje eĉ ne de la esperantistoj mem!

Jam komence de la prelego, la verkisto faras al si la du jenajn demandojn: "Ĉu vere la lingva problemo estas afero absolute neebla, nerealigebla, sciencfikcia? Kio do respondas al tio la sciencfikcio?" Kaj, kompreneble, li tuj klopodas respondi per interesa esploro de la plej tipaj verkoj de la sciencfikcia ĝenro, bazinte sin sur antaŭa esploro farita de la tre kompetenta esperanta verkisto kaj eseisto Bernard Golden.

Iom post iom la prelego malkovros por ni diversajn faktojn foje ne tro konataj. Ekzemple: multaj famaj sf-verkistoj uzis Esperanton aŭ aludis ĝin en siaj verkoj. Kelkaj el ili lernis la lingvon kaj eĉ rigardis au ankoraŭ rigardas sin esperantistoj. Kion diri, ekzemple, pri unu el la iniciatinto de la sciencfikcia ĝenro Jules Verne, kiu estis eĉ honora prezidanto de la E-klubo de Amiens?

En la prelego, kiu, ni memoru, estas adresita al ne esperantistoj, prezentiĝas, kiel plej fantasta, fakto absolute natura por la normala parolanto de la Internacia Lingvo, nome: la ekzisto de sciencfikciaj verkoj originale verkitaj en esperanto.

Flugrigardo al la sciencfikcia verkaro ekzistanta en nia lingvo konigas al ni la ĉefajn aŭtorojn kaj verkojn kreitajn de nia kulturo en la kadro de tiu aparta ĝenro.

La renkonto kun la nuna situacio liveris al ni pli koncizan rigardon pri la agado de Grupo Nifo, kies modesta sed persista eldonado motoras la evoluon de ĝenro, en kiu la Esperanto-komunumo, feliĉe, kapablas ne postrestu sed, eĉ foje, superi aliajn lingvogrupojn.

Fine, la projektoj de Grupo Nifo por estonteco, kiu anonciĝas vere fekunda kaj plena da sukaj fruktoj, kun la apero de tute nova libro-kolekto plene dediĉota al la traduka branĉo (legu la intervjuon kun Liven Dek).

Entute tre interesa renkonto kun fako de nia kulturo, kiu lastatempe montris sin aparte vigla en kaj ekster la limoj de nia kara lingvokomunumo.

Laŭ informoj de *Grupo Nifo*

(daŭrigo de la paĝo 4)

Ĉiu lando kun sia lingvo, ĉiu homo kun siaj ideoj aŭ religio, sed super ĉio ĉi, komuna morala konduto ebliganta harmonian kunvivadon. Tio jam ne devas esti revo, sed devo. Enkonduki tiun ŝanĝon de pensmaniero estas precize la tasko de la esperantismo survoje al universala civilizacio.

Giordano Moya

Vortoj kun fantasfulo

Gazeto Andaluzia: Kiam kaj kial vi decidis lerni E-on?

Liven Dek: Amiko esperantisto de mia patro transdonis al mi libreton *Esprimo de sentoj en E-o* kaj ĉar mi tiam deĵoris ĉe la militservo mi uzis tiun tempon por lerni la lingvon pere de tiu libreto.

GA: Via agado ene de Esperantio estas tre ampleksa: instruado, organizado, verkado, eldonado... Kiu aspekto plej gravas al vi?

LD: Verkado. Kial? Fakte, E-o estas ilo kiun mi volas uzi, ne labori por ĝi sed per ĝi. Bedaŭrinde mi ne havas sufiĉan tempon, ĉar mi sentas, ke la Movado bezonas miajn konojn kaj mi ofertas miajn fortojn al ĝi.

GA: Ĉu vi ekagadis pro propra volo, ĉu vi sentis ian mankon en la movado, kiun vi kredis solvebla, kio igis vin ekagadi?

LD: Mi komenci agadi ĉe HEJS [Hispana Esperantista Junulara Sekcio], kaj oni nomumis min reprezentanto de HEJS ĉe kongreso de TEJO [Tutmonda Esperantista Junulara Organizo] en Danlando kaj poste oni nomumis min TEJO-estrarano, do mi iompostiome engaĝiĝis en la aferoj.

GA: Nu, pri via beletra aspekto. Multaj esperantistoj konas vin kiel Miguel Gutiérrez Adúriz, sed eĉ pli multaj, kiel Liven Dek. Kion signifas via plumnomo? El kie ĝi devenas?

LD: Kiam mi redaktoris la HEJS-revuon, mi devis verki pli ol unu kunlaboraĵo por ĉiu numero, kaj mi decidis uzi plumnomon por iuj el ili. Mi elektis *Liven Dek* nur pro la beleco de tiuj vortoj.

GA: Via plej fama verkado sendube estas sciencfikcia, sed ankaŭ aperis poemojn kaj alitipajn novelojn. Kion vi preferas verki kaj kiel?

LD: Eble plej konataj estas miaj noveloj, kiuj aperis en *Sferoj* kaj en *Literatura Foiro* kaj eĉ en *Nova Krestomatio de Esperanto, Trezoro...* Mi ne estas esence poeto, kvankam mi aperas en *Ibere libere*, sed prozisto.

GA: Eldonejo *Pro Esperanto* (de Vieno) aperigis aron da poemoj viaj kaj de aliaj iberiaj poetoj. Kion vi pensas pri la kasedo de malaga muzikisto Solo, kiu muzikigis viajn poemojn?



Liven Dek ade prilaboras siajn projektojn

LD: Solo havis la ideon uzi niajn poemojn, petis permeson kaj sendepende aldonis muzikon. Lia muziko estas aparta, sed laŭ mi bela. Fakte en la kasedo estas vere ĝuindaj momentoj.

GA: Diru al ni ion pri la *Sferoj*-libroj. Ili ŝajne aperas fare de Grupo Nifo. Certe ne temos pri Nombro Identiga Fiskcele, ĉu?

LD: Temas denove pri belsonora vorto kaj vorto kiun mi volis diskonigi ene de la E-movado kies vera signifo estas Neldentigita Flugantaĵo (NIF-o).

GA: Kio pri ilia estonteco?

LD: Ili daŭre aperos, sed ekde la 10a numero la serio estos dediĉita al verkoj originale verkitaj en Esperanto. Aldone mi lanĉos novan kolekton, en kiu aperos nur tradukoj. La nomo estos *Orbito Nula*. Verŝajne la unua aperos fine de la jaro 1994.

GA: Ĉu fakte la eldonado de esperantaj sciencfikciaj libroj ne estas ruiniga? Ĉu ĝi vere permesas almenaŭ ricevi la monon, uzotan por venonta eldonaĵo?

LD: Ne tiom ruinaj, ili vendiĝas bone. Montriĝis ke en nia komunumo ekzistas sufiĉe da legantoj por tia genro.

GA: La hispana esperantistaro renkontiĝis en Malago. Kion vi pensas pri la farto de E-o en Hispanio, anta kaj onta?

LD: Nuntempe la E-movado ĝuas la plej favoran momenton en sia historio. Ĝi disponas ilon antaŭe eĉ ne imagitan de la E-istoj. La problemo kiu kuŝas antaŭ ni estas kiel uzi ĝin ĝuste.

GA: Laste, sed ne malplej grave. Kion vi rekomendus al esperantisto ema agi, sed nescianta kion fari?

LD: Turni sin al lia profesoro; se lia profesoro ne kapablas gvidi lin tra la ĝangalo de la movado, li serĉu la konsilon de harditaj esperantistoj, tio estas, la Centra Oficejo de HEF.

GA: Dankon, Miguel, belan futuron por viaj agadoj.

(daŭrigo de la paĝo 5)

Monda Merkato, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, Germanio

Turismo per E-o, Via Casale 7, I-20144 Milan, Italio

Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094, Bydgoszcz, Pollando

Sortimento (kaj la revuo *Mono*) : ĉe BAJAKI Imre, Kiskunfélegyháza, Dr. Holló Lajos u. 61, 6100 Hungario

frapantaj fiaskoj de ties instruado pruvas evidente ke la lernado de tiu lingvo estas malfacila.

-La teoriistoj de la didaktiko intencas atingi internacian demokration, respekton de aliaj kulturoj, pacan kunvivadon, per naciista rimedo kia la intrudo de nacia lingvo. La logika kaj reala rezultato ĉiam estas la plifortigo de ŝovinismaj sintenoj.

-La 14an de decembro, 1989, la Ministra Konsilantaro pri Edukado de la Eŭropa Komunumo aprobis plurajn modifojn de la programo Erasmus, kies buĝeto por la tri sinsekvaj jaroj (ĝis 1992) superis 25 miliardojn da pesetoj.

-Lionel Jospin, ministro pri edukado de Francio, en 1992 antaŭvidis dungi 3500 fremdlandajn instruistojn por lernigi fremdajn lingvojn en Francio.

-Eŭropa Komunumo: en 1987 oni tradukis plio ol unu miliono da paĝoj, la triono de la laborantoj de la Komisiono kaj la duono de la Eŭropa Parlamento plenumas tradukajn kaj interpretadajn taskojn.

-Don Luis Rubio, katedratiko pri Lingvo de la Universitato de Murcia, kalkulis la kostojn: 800000 paĝoj x 500 dolaroj (kosto de la traduko de ĉiu paĝo en EK) = 400.000.000 dolaroj.

-La Hispana Registaro agadas tute same al la plej grandaj potencoj. Per Instituto Cervantes kaj ties buĝeto agadas ŝovinisme, ne laŭ internacia demokratio. Oni antaŭvidis la jenajn elspezojn 2000 milionojn da pesetoj por ekfunkciigi ĝin kaj poste ĉirkaŭ 6000 milionojn da pesetoj po jaro.

-En Hispanio oni instruas la anglan amase. Malgraŭ tio, ke la respondaj elspezoj estas imponaj kaj la rezultatoj estas malbonegaj, nek ekonomistoj, nek sociologoj, nek pedagogoj atentigas pri tio la aŭtoritatulojn. Ja, la naiveco kaj la senrespondeco montrata limiĝas kun la stulteco.

Tia estas la situacio en la Eŭropa Unio. Vortoj por Esperanto; mono, por aliaj lingvoj. Nur blinduloj ne perceptas ĉi tiun realon kiu bremsas socie la rekonon de nia internacia lingvo. Kaj ankoraŭ estas kiuj kontentiĝas akceptante iujn panerojn!

Denove vi gajnos premion se vi sendas al ni la korektajn solvojn de la krucvortoj kiujn vi havas sur la paĝo 13. Memoru: sendu vian leteron al la redaktoro, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago antaŭ la 15 de novembro.

Travivaĵoj

Ne atendu la leganto trovi ĉiĵoj kongresan kronikon; ankaŭ ne ampleksan studon de la temoj konsideritaj. La celo de la aŭtoro konsistas tute simple en la esprimo de liaj travivaĵoj okaze de la organizado kaj evoluo de la lasta kongreso de Hispana Esperanta Federacio en Malago en la pasinta julio.

Kiel sciante, grupo de AEUanoj konsistigis la Organizan Kongresan Komitaton (OKK) kaj respondecis tiel pri la planado de la agadoj kaj la kontaktoj kun personoj kaj institucioj, kiel pri la plenumado de ĉiuj antaŭvidaĵoj. Helpe de ili kaj de José Fco (sekretario de AEU kaj ĉefredaktoro de *Gazeto Andaluza*) kaj Paqui Corrales, ĉio iris glate.

Antaŭvidoj

Laŭ interkonsento de S-ro Alonso Núñez (prezidanto de HEF) kaj la prezidanto de OKK, la celo kaj la rimedoj de la Malaga kongreso akordu kun la situacio de la Movado kaj la sperto atingita. Konkrete ni pensis, ke nuntempe necesas laborkongresoj anstataŭ la tradiciaj festokongresoj, ĉar ĉispecaj renkontiĝoj estas plej

taŭgaj ŝancoj por debati la internajn aferojn de la esperantistaro kaj la agadplanojn plenumebajn ene de la socio.

Kompreneble, ni antaŭvidis ke, kiel delonge, estos aliĝontaj personoj ne sufiĉe interesitaj de nia internacia lingvo. Por ili kaj por malstreĉi la interesitojn, dekomence ni planis kurson de andaluzaj dancoj, ekskurson, viziton de la urbo, ekspozicion de pentraĵoj kaj koncerton. Tamen, mi rimarkas tion, nia celo estis okazigi veran laborkongreson. Tial, oni decidis ke la ĉefa kongresa temo estu *La Esperantigo de la Socio*, kaj ke oni debatu plej amplekse plurajn tiurilatajn aspektojn: internaj aferoj



de HEF, instruado, politiko kaj ekonomio.

Evoluo

Kiel antaŭvidite, la sabaton, je la 12.30, malfermiĝis la Kongreso. Ekde tiam estis notebla iu serioza sinteno flanke de la ĉeestantaro. Mi supozas, ke ne ĉiuj komprenis en la unuaj kongresaj horoj ke la aranĝoj antaŭviditaj de OKK sukcesu. Malgraŭ tio, memvideblis ke HEF bezonis/-as ĉitipajn kongresojn por pritrakti ĝisfunde siajn problemojn, sukcesojn, malsukcesojn, projektojn, agadplanojn kaj strategiojn. Poste, ekde la dua tago, abunda ĉeesto kaj partopreno de gekongresanoj pruvis ke OKK trafis tiel pri la temoj kiel pri la organizo.


Ĉiuj laborkunvenoj antaŭviditaj okazis: HEF, Esperanto kaj Politiko, Instruado de Esperanto kaj Aplikado de Esperanto en Ekonomio. Ĉiam tre utilis la Dokumentaro liverita al gekongresanoj, ĉar ĝi enhavis la materialon studendan dum la kongreso. Bonsorte, tiamaniere en ĉi tiuj kunvenoj estis tuj vere laboraj kaj kontentigaj. Aparte, la prelegoj pri homaranismo, sciencfikcio, supersignoj kaj laboristaro. Pri ĉio aperos ĉijare verko eldonita de HEF. Ĝi enhavos, krom la tekstoj de la prelegoj, ampleksan priskribon de la debatoj kaj la konkludoj. Aparte, *Boletín* de HEF publikigos ĉijare, en sia antaŭlasta numero,

kompletan raporton pri la kongreso. Al la interesitoj mi konsilas ĝian legadon. Cetere, la studo de tiu dokumento estos nepre por kompreni la realon kaj la senperan estonton de la Movado en Hispanio. Kontentiga nombro de gelernantoj ĉeestis la klasojn de Esperanto. Pro pluraj motivoj la kurso de andaluzaj dancoj ne okazis. En la asembleo de AEU oni pritraktis la temojn anoncitajn en la Tagordo kaj por ĝenerala kompreno de ĉiuj AEUanoj, en la aŭgusta numero de *Monate Ĉe Vi* aperis la responda informo.


Amuzoj estis iuj, nur la necesaj por malstreĉi la animojn post daŭra laborado. Elstaris la koncerto de Solo, la ekskurso al Marbella kaj Mijas, la vizito al la Alcazaba kaj Gibralfaro kaj la ekspozicio de pentraĵoj de Ángeles Salazar. Mi estas certa, ke dum longa tempo neniu forgesos la belecon kaj la amikecon kiun ni travivis.

Resume, novtipa kongreso, akorda kun nia tempo, ties postuloj kaj ties valoroj. Nun restas plenumi la agadojn planitajn kaj provi la rezultatojn en Gijón, kie ni renkontiĝos la venontan jaron.

Andreo



Krucvortoj



Horizontale:

1. Servas por esprimi pensojn kaj ideojn. 4. Esprimi doloran senton per plendaj sonoj. 6. Bonhumoraj. 7. Mize. 9. Konforma kun la bonaj moroj, devoj kaj virtoj. 12. Inverse, serio da objektoj. 15. Flanka porta surfaco de aviadilo. 17. Rilata al la haroj formantaj la felon de ŝafoj. 20. Dika porka intesto, farĉita per tre spicitaĵoj el porko. 23. Prezenti al si en la spirito antaŭe viditajn bildojn tiel intense, ke oni kredas ilin vidi, percepti aŭ senti. 24. Taval' da tero, alportita de la akvoj. 25. Meritanta ion. 26. Kalka arboforma skeleto de diversaj kolonioj de kniduloj, ordinare fiksita al submaraj rokoj.

Vertikale:

2. Loĝanto de eŭropa lando. 3. Atentinda pro sia granda influo aŭ sekvoj. 4. Tre juna planto, ĵus aperinta el semo. 5. Vundi per la dentoj. 8. Blanketaĵoj, perdintaj sian naturan koloron. 9. Dekfoje cent. 10. Senvosta amfibi'. 11. Artikolo. 13. Komputile, centra procesa unito. 14. Plenda ekkrio. 16. Sufikso montranta la egalajn partojn de tuto. 18. Batalilon. 19. El alia eŭropa lando. 21. Kaŭz' malagrablan korpan senton. 22. Ornamaĵ', kutime tre multtekosta.

Poezia Angulo

Ĉinumere. anstataŭ poemon, ni liveras al vi prozon; poezian, sendube... Temas pri la unua ĉapitro de Platero kaj Mi, de J.Ramón Jiménez, traduke de Liven Dek. La tradukinto informis nin, dum la kongreso de HEF, ke li jam tradukis duonon da Platero; ĝis ni povos legi la tutan libron, ĝuu ĉi tiun unuan ĉapitron!

Platero estas eta, vila, milda, ekstere tiel mola, ke ĝi ŝajnas tute kotona, senosta. Nur la gagataj speguloj de ĝiaj okuloj duras kiel du skaraboj el vitro nigra.

Mi lasas ĝin libera, kaj ĝi iras la herbejon, kaj per sia muzelo karesas delikate, faciltuŝe, la floretojn ĉielbluajn, rozajn kaj flavajn... Mi vokas ĝin dolĉe: Platero!, kaj ĝi venas al mi per gaja troteto, ke ŝajnas ke ĝi ridas ĉe mi ne scias kia petolo ideala...

Ĝi manĝas ĉion, kion al ĝi mi donas. Plaĉas al ĝi la oranĝoj mandarinaj, la sukcenaj uvoj muskataj, la violaj figoj kun sia kristala guteto miela...

Ĝi estas tenera kaj kaĵola same kiel infano, kiel infanino...; sed interne seka kaj forta kvazaŭ ŝtona. Kiam sur ĝi mi rajdas, la dimanĉojn, tra la lastaj stratetoj de la vilaĝo, la kamparanoj, lante paŝantaj en puraj vestoj, longe ĝin rigardas:

—Ĝi 'stas ŝtala...

Jes, ĝi estas ŝtala. Ŝtala kaj lun-arĝenta samtempe.



ESTAS JAM TEMPO

Kial silenti mue senvorte
nin cedante al sortofatalo;
kial sen ago stari malforte
ĉe l'altaro de Mondidealo;
kial ne rompi dise per Amo
la katenojn de l'sklava homaro
kaj eklumigi per sankta flamo
la deviojn de l'homa frataro,
se estas jam tempo!?

Kial ne agi, kiam en sango
baraktante veadas nacioj,
kiam la larmoj finas sur vangoj,
furiozas militaj furioj,
kiam sen kredo, sen konduktanto,
sin perdante en vivlabirintoj,
vane atendas je la Savanto
la viktimoj de celon perdintoj,
se estas jam tempo!?

Fratoj! Ni havas forton, potencon
kun majesta ideo en koro!
Ne atendente la rekompenco
helpu ni en giganta laboro!
Fartoj! Morgaŭan tagon pripenti
antaŭ la sunleviĝo - ridinde!
Ami instruu homojn kaj senti
teni sin je nom' de l' Homo inde,
ĉar estas jam tempo!

Fratoj! Nin vokas nia ideo!
Do levante la kapon ni iru!
Nin ne timigu eĉ la pereco
nur pri venko triumfa sopiru!
Fratoj! Sed, se ni ĉiuj pereus
por ideo en paca batalo,
kredu, se eĉ tutmondo ĝin neus,
venkos certe la Mondidealo,
ĉar estas jam tempo!

J. Baghy

Prilingva Politiko

Ke la lingvo Esperanto ne estas, ekskluzive, politika afero, tio certas; ke bazigi la nunon kaj la estonton de nia internacia lingvo *nur* sur la subteno de ajna politika partio povas faligi la movadon en iu konkreta lando, ankaŭ certas. Tamen, estas devige rekoni, ĉar evidente, ke, ĝis hodiaŭ, nia movado sukcesas grave en landoj kun politikistoj defendantaj publike la disvastigon kaj aplikadon de E-o. Ankoraŭ pli: E-o sukcesas nur kie troviĝas politikaj partioj kies programojn karakterizas la internacieco.

Lingvo estas ekstera signo de etnio. Ni, hispanoj, komprenas tion tre bone. La rifuzo de la kastilia lingvo en iuj regionoj, kaj tiu de la vaska, kataluna, galega, k.a. en konkretaj partoj de nia geografio, antaŭe kaj nun, pravas la gravecon de la lingvo por ajna popolo. Tiurilataj notindaĵoj estas, ekzemple, la jenaj:

-En Eks-Sovetunio, kies loĝantaro jam atingis la sumon de 284'5 milionoj da personoj, la nombro de lingvoj parolataj estas ĉ. 130. Oficialaj aŭ ŝtataj lingvoj en la koncernaj respublikoj estas la rusa, ukraina, uzbeka, belorusa, kazaha, azerbajĝana, armena, kartvela, taĝika, litova, moldava, turkmena, kirgiza, latva kaj estona. La alfabetoj uzataj: cirila, latina, armena, kartvela, hebrea. Kvin plej multnombraj etnoj:

rusoj (137 milionoj), ukrainanoj (42 milionoj), uzbekoj (12 milionoj), belorusoj (9 milionoj), kazahoj (6 milionoj). Tamen aliaj ŝatas sin, pravege, tiel gravaj kiel la menciitaj.

-La lingva katalunigo indignigas la gepatrojn postulantajn por siaj gefiloj dulingvan edukadon. La venontan semajnon, la katalunaj infanoj aŭskultos, parolos kaj studos en la kataluna lingvo, nur en la kataluna. Dekreto de la kataluna registaro malaperigas tute la kastilian en la lernejoj programoj, ĝis la tria kurso de Unua Instruado, la kurso ekvivalenta al la tria de Ĝenerala Baza Edukado. En Vall de Arán oni intencas ankoraŭ pli plifortigi la prilingvan kaj naciisman decidon: nek kastilian, nek katalunan: nur aranan. (El *El Mundo*, 7 dias, 05-09-93).

-Je internacia nivelo, estas devige rekoni, ke nur la Radikala Partio (ne iuj partianoj), ĉar transnacia, defendas la uzon de Esperanto kaj aplikas ĝin. Mi citas: "Ni volas publike aserti la rajton je la lingvo, kiu (kiel opinias Giuseppe Turi, ĝenerala sekretario de la Internacia Akademio pri Lingva Juro) devas esti rigardata kiel 'fundamenta, eksplicita kaj memstara rajto, ĉefa antaŭkondiĉo por praktikado de la ceteraj fundamentaj rajtoj'. Se vere oni kredas je la rajto pri lingvo, je ĝiaj du principoj (digneco kaj egalrajteco de ĉiuj lingvoj), tiam stariĝas kelkaj

demandoj: ĉu estas normale, ke nacia aŭ loka lingvo alprenas la rolon de internacia lingvo? Kiaj estos la sekvoj sur la ceteraj naciaj kaj lokaj lingvoj kaj kulturoj? Kiaj estos la sekvoj sur tiu sama lingvo kaj sur tiu sama kulturo, akirintaj malpropran internacian rolon?" (El *La Partio Nova*, marto 1992)

Ni scias, ke la respondo al tiuj demandoj konkretiĝas en la uzado de Esperanto. Tion ripetas kaj ripetis de antaŭlonge multaj samideanoj en tri gravegaj internaciaj organizoj, kiaj Ligo de Nacioj, Unesko kaj Eŭropa Komunumo (hodiaŭ Eŭropa Unio). Kion ili atingis?

LIGO DE NACIOJ Jam en 1920, en la unua kunveno de la Ligo, kelkaj delegitoj rekomendis rezolucion favoran al E-o kaj petis ke la sekretario preparu raporton. Post la favora informo de la vicsekretario ĝenerala d-ro Nitobe, kiu estis vizitinta E-kongreson en Praha, tiun proponon oni akceptis kaj la sekretario ricevis komisionon prepari raporton. En 1923, tiu komisiono faris rezolucion rekomendante antaŭ ĉio la studadon de vivantaj lingvoj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj por la intelekta alproksimiĝo de la diversnaciaj homoj kaj do, malfavorante E-on. Tiu rezolucio, bazita sur politikaj intrigoj en la kunveno de la Ligo mem, ne sukcesis. Poste, en 1924, la persa delegitaro proponis rezolucion rekomendantan la traktadon kaj la

tarifon de tiel nomata *klara lingvo* (ne kodo) por E-o. Tiu rezolucio estis akceptata de ĉiuj kaj estis la unua interŝtata rekono de E-o kiel uzata lingvo. En 1925 la Universala Telegrafa Unio en sia tutmonda konferenco en Parizo sekvis la rekomendon de la Ligo kaj E-o estis allasata kiel "klara lingvo"

UNESKO Tri rezolucioj favoraj al E-o. En la unua rezolucio, de 1954, en Montevideo, la Ĝenerala Konferenco notis, ke pluraj ŝtatoj-membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksi la instruadon de E-o en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petis tiujn Ŝtatojn-membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj en tiu kampo. Krome, la Konferenco komisiis la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de E-o en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

En la dua, en 1985, en Sofio, la Ĝenerala Konferenco invitis la Ŝtatojn-membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri E-o en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado. Krome, la Konferenco rekomendis al la neregistaraj organizoj aliĝi al la festado de la

centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

En la tria, la Ĝenerala Konferenco petas la Ĝeneralan Direktoron konsideri la rezultatojn atingitajn de la movado disvastiganta E-on: a) en la Sinteza Raporto pri ellaborado de instruprogramoj, pri trejnado de instruistoj kaj pri novigoj en la kampo de edukado por internacia kompreniĝo, paco, homaj rajtoj kaj demokratio, b) en la redaktota manlibro pri gvidaj principoj por komunikado de pacvaloroj, krome, la Konferenco petas la ŝtatojn-membrojn raporti pri la agado plenumita kiel sekvo de la rezolucio 11.11 de 1985, precipe koncerne la studprogramojn pri Esperanto kaj iliajn rezultojn.

EŬROPA UNIO. Mi kopias la unuan artikolon de la Reglamente n-ro 1 de la Konsilantaro, laŭ la aktuala teksto: "La oficialaj lingvoj kaj la laborlingvoj de la institucioj de la Komunumo estos la germana, la kastilia, la dana, la franca, la greka, la angla, la itala, la nederlanda kaj la portugala". Tiu kaj tia estas ĉiam la oficiala respondo de la koncernaj aŭtoritatoj de la Komunumo kiam oni demandas al ili pri la ebleco / neceso uzi E-on en ĝi. Kial okazas tio? Neniu prilingva programo enhavas proponojn pri ĉi tiuj temoj: kiom da personoj kapablas scipovi plurajn lingvojn, kio signifas

scipovi plurajn lingvojn, kiuj sociaj grupoj reale bezonas studi lingvojn, kiuj estas la limoj kaj la eblecoj de la tradukado kaj la interpretado, ĉu nur talentuloj devas studi alinaciajn lingvojn, kiuj estas la realaj kostoj de la nuna prilingva politiko.

Nur eblus la uzado de pluraj lingvoj, se ties kono estus sufiĉe vasta kaj profunda. La aŭtoritatoj ne atentastion kaj ili kontentigas sin memmensoge ripetante ke la loĝantaro lernu multajn lingvojn.

OKAZINTAĴOJ

-Vortoj el François Mitterand al esperantistoj: "Vi jam scias, ke pro tradicio kaj pro inklino, la Socialisma Partio estas tre internaciema. Tio, kio favoras la kunvivadon inter la popoloj, kaj tio, kio ebligas pli bonan internacian komprenemon, nepre ricevas mian personan subtenon. Ni, do, emas al la instruado de Esperanto kaj al ĝia helpo pere de Nacia Eduko por ebligi ĝian disvastigon. Ankoraŭ estas multaj antaŭjuĝoj por venki, kaj insidoj por superi, sed per via apogo mi estas certa, ke ni atingos ĝin".

-Lingvaj kaj literaturaj konsilantoj atentigas pri la neceso debati pri la nuno kaj la estonto de la instruado de la lingvoj por respondi al la nova komunikada situacio kaj evoluigi la kapablojn lingvajn de la lernantoj.

-La sennombraj klopodoj faritaj por lernigi la anglan lingvon kaj la

Muziki Solon

Jen intervjuo post la koncerto de Solo, la 18an de julio, en la HEF-Kongresejo. Ĉeestis la koncerton pli malpli 100 personoj.

Gazeto Andaluzia: Solo, vi estas muzikisto kaj esperantisto. Kio venis unue?

Solo: La muziko, tucerte, ĉar en la ventro de mia patrino jam aperis la muziko. Poste, kiam mi estis 15jaraĝa, mi jam komencis aŭskulti diversajn muzikaĵojn kaj poste, kiam mi estis 20jaraĝa, mi eklernis.

GA: Kiam kaj kiel vi decidis lerni E-on?

S: Mi konis E-on per la Esperanto-strato de Malago kiam mi estis infano. Poste mi sciis, kio ĝi estas. En la jaro 1982, la biciklisto Prieto parolis al mi pri ĝi, sed mi ankoraŭ ne pensis lerni, sed poste, alia amiko memorigis min pri la ekzisto de Esperanto, kaj mi kontaktis rekte Julion [Herreron], kiu tiam gvidis kurson ĉe RENFE.

GA: Kial vi opinias Esperanton taŭga ilo por via muzika agado? Ĉu vi muzikas alilingve?

S: Antaŭe mi muzikis hispanlingve, sed kiam mi eksciis pri E-o, mi konstruis strangan miksaĵon kiu similis al E-o, sed baptitan de mi kiel *angla de la montaroj*. Mi opinias ke la universala lingvo povas esti granda

pordo por la komunikado inter la diversaj popoloj de la mondo kaj ankaŭ povas esti interesa por materia kaj spirita komunikado.

GA: Ĉu vi ekagadis pro propra volo, ĉu iu igis vin ekagadi?

S: Kompreneble pro propra volo. Mi rilatigis Esperanton kun aliaj spiritaj fenomenoj de la universala komuniko. Mi pensas, ke nia planedo Tero devas havi nur unu lingvon.

GA: Diru al ni ion pri via muziko.



Super ĉi tiuj linioj, la kovrilo de *Vulkano*, la lasta albumo de Solo.

Ekzemple, kial vi elektis Solon kiel muziknomon?

S: Ĉar ĝi estas facila nomo, facile prononcebla por ĉiuj. Solo signifas ankaŭ spiritan solecon en la Kosmo; ankaŭ solan kafon, ankaŭ muzikan solon, Han Solo, el *Stelaj Militoj (Star Wars)*...

GA: Kiom da diskoj aŭ kasedoj vi aperigis ĝis nun?

S: Danke al la apogo de AEU, aperis en 1989 mia unua albumo *Kosmoinfano* (surdiske); en 1992, aperis la kasedo *Ili estas nur kanzonoj* kaj en 1994 mi komencis pretigi la muzikaĵojn por la poetoj de la grupo *Ibere libere, Vulkano*.

GA: Ĉu vian muzikon oni konas nur en Andaluzio, aŭ eĉ en foraj landoj?

S: Eĉ en Aŭstralio, oni konas min. Ĝis 1992, mi koncertis en Hispanio (en 1989, en Toroks', en 1991 en Tarragona, en 1992, mi koncertis en la HEF-Kongreso de S.Cugat del Vallès); tiujare, mi koncertis en Francio (Montpellier, Toulouse, Saverdoun, Laroque-d'Olms, Bordoza, Limoges, Rodez). En 1993, mi koncertis en la Universala Kongreso de Valencio (pri tio oni informis en la revuo *Esperanto*). Poste, en novembro de 1993, mi koncertis en Pariso.

GA: Eldonejo Pro Esperanto (Vieno) aperigis aron da poemoj *Ibere libere*. Kial vi muzikigis tiujn poemojn? Ĉu la kvaropo da aŭtoroj

instigis vin? Kia estas via rilato kun ili?

S: Miguel Fernández petis min muzikigi iujn poemojn en 1992. Mi selektis la poemojn, kaj muzikigis ilin. Nur poste mi montris al ili la rezulton (kiun ili ŝajne ŝatis).

GA: Diru al ni ion pri viaj estontaj projektoj.

S: Mi planas iujn koncertojn en Hispanio. Mi nun ne intencas verki novajn muzikaĵojn, sed koncentriĝi en la disvendo kaj diskonigo de mia muziko pere de la kasedo kaj koncertoj.

GA: En la koncerto de Malago vi prezentis krom via esperanta moderna muziko, ankaŭ esperantan simfonian muzikon. Parolu al ni pri tio.

S: *Vulkano* temas pri du partoj: la unua jam aperinta, moderna muzikigo de la poemoj *Ibere libere*, kiun mi provos, ke iu eldonigu aparte, kaj la dua, ankoraŭ ne aperinta albume, nur koncerte, estas la vera *Vulkano kaj allojoj por voĉo kaj sintezilo, opus 1*, kiu estas muzikverko pensita por simfona orkestro, sed nune ludita per sintezilo kaj voĉo.

GA: Ĉu vi intencas, ke orkestro ludu ĝin?

S: Jes, sed mi ankoraŭ ne trovis la eblecojn.

GA: Dankon, Solo, kaj ĉian bonŝancon.

S: Mi dankas vin, AEU, kaj ankaŭ HEF, pro la invito al la Kongreso.

Eksterlandano rakontas

Tre multaj el ni loĝas aŭ almenaŭ loĝis eksterlande. Ja estas nature, ke homoj, kiuj parolas internacian lingvon, ankaŭ facile ekhavas kontaktojn kun aliaj landoj, trovas amikojn aŭ amatojn ekster la limoj de sia naskiĝlando. Cetere, ĉiuj ni ja estas eksterlandanoj – por la plej multaj aliaj esperantistoj.


Kiam, antaŭ pli ol 13 jaroj, mi eklernis Esperanton, mi neniel supozis ke tiu nova lingvo (kaj la movado ĉirkaŭ ĝi) savos mian vivon. Komence de 1981, Esperanto estis nur unu plia lingvo inter la jam konataj lingvoj. Ĝi estis unu plia fenestro al la mondo, for de kiu diktatura reĝimo izolis min kaj miajn samlandanojn.

Eĉ en miaj plej teruraj premsonĝoj, mi ne povis imagi ke pro simplaj kono kaj uzo de alia lingvo mi estos persekutata kaj intervjuata de la fifama rumana sekreta polico. Nek

povis mi imagi ke iam mi gajnos mian ĉiutagan panon ĝuste per tiu lingvo, kaj eĉ malpli, ke tio okazos en lando fremda kaj fora.

Kaj tamen revoj kaj sonĝoj povas realiĝi. Post kvarjara, senespera atendado, mi sukcesis printempe de 1988 forlasi la *laboristan paradizon* kaj setli en Kalifornio. Kaj tio okazis ne tute sendepende de Esperanto. Mallonge, tiu epizodo de mia vivo jenas:

Ricevante elmigran pasporton (sencivitanecan) mi perdis en mia denaska lando ĉiujn ankoraŭ restantajn rajtojn: labori, studi, aĉeti la bazajn nutraĵojn, loĝi ekster la domo de miaj gepatroj. Mi gajnis tamen devon: regule pagi por la vizo, kiu rajtigis min vivi en Rumanio kiel *eksterlandano*. Imagu en kia situacio estis mi, sen la rajto oficiale gajni monon sed devigata pagi por vizo en mia lando.



Samtempe, neniu el la ambasadoj kaj konsulejoj en Rumanio pretis doni al mi enirvizon por la de ili reprezentataj landoj sur pasporton de persono sen civitaneco. La afabla nederlanda konsulo en Bukareŝto donis al mi la ideon akiri dokumenton per kiu firmao aŭ organizo en lia lando agnoskus la pretecon dungi min.

Mi tuj telefonis al la Centra Oficejo de UEA, por klarigi mian (nekutiman) peton, kaj ties direktoro, sen doni al mi ian ajn esperon, promesis interesiĝi pri eventualaj eblecoj. Miaj esperoj estis preskaŭ malaperintaj, kiam la Usona Ambasado en Rumanio anoncis al mi, ke mi (finfine) rajtas akiri enmigran vizon por Usono.

Nur post mia alveno tien ĉi mi eksciis ke la supre menciita direktoro kontaktis rumani-devenan esperantistinon en Kalifornio, kiu pere de rumana organizo tie sukcesis havigi por mi vizon. Ŝajnis esti la unua gajno de mia obstina esperantumado.

Preskaŭ unu jaron mi, kiel novalveninto, laboris (ne facile) en la konstruindustrio, ĝis la printempo de 1989, kiam mi dungiĝis kiel vicdirektoro de la Centra Oficejo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA). Jen laboro, kiun mi ŝatis, malgraŭ la modesta salajro. Foje oni laboras ne pro la (financa) gajno el la koncerna laboro, sed pro

amo al ĝi. Post pli ol kvin jaroj mi ankoraŭ laboras samloke, kaj sen ia ajn bedaŭro. Ĉu la dua grava gajno de mia esperantisteco?

En la izolita Rumanio de la 80-aj jaroj, pere de Esperanto mi sukcesis ne nur informiĝi (kvankam sporade) pri la *ekstera* mondo, sed ankaŭ krei dumvivajn amikecojn. En la nova lando, pere de Esperanto mi sukcesis travivi kaj daŭrigi mian kulturigon, kio malsame okazintus sen Esperanto.

Neniel volas mi aserti¹ ke sen Esperanto mi mortintus en mia adoptlando. Se neniu *akcidento* sukcesis senigi min de mia vivo en la Rumanio de Ceausescu, kiel okazis al aliaj malsilentemuloj, ĉi tie eĉ malpli probablaj estis tiaj *akcidentoj*. Mi volas tamen emfazi la fakton, ke kompare kun aliaj enmigrintoj tien ĉi (kaj kiu ne trovas sian lokon en samnaciaj komunumoj), mi apenaŭ suferis la ŝokon de la ellandiĝo. Jam ekde la unuaj tagoj tie ĉi, mi estis ĉirkaŭata de samlingvanoj (ne temas pri rumanoj) inter kiu mi sentis min eĉ pli komforte ol inter personoj parolantaj la saman denaskan lingvon kiel mi.

Ekzistas ja diferenco inter denaskaj parolantoj de naciaj lingvoj kaj esperantistoj. La unuaj parolas lingvon, kiu venis al ili (kun ĉio bona kaj malbona) kune kun la patrina lakto kaj la unuaj gepatraj skoldoj. La aliaj konscie elektis la parolatan

lingvon, kaj pro tio (eble) sentas sin pli ligitaj al ĝiaj parolantoj ol al la parolantoj de la denaska lingvo, kiun ili respektas ne pli ol aliajn lingvojn.

Ĉu mi estas escepto tiel pensante? Eble, pro la fakto ke mia denaska lingvo estas tute fremda en mia adoptlando, preskaŭ same fremda kiel la ĉi-tiea lingvo en mia devenlando.

Inter du malsamaj mondoj kun malsamaj lingvoj, la lingvo konscie elektita de mi ŝajnas esti la plej proksima al mia koro. Ne nepre ĉar en ĝi mi legas, verkas kaj parolas pli multe ol en alia(j) lingvo(j), sed ĉar ĝi ŝajnas esti la plej bona (la sola?) kompromiso en mia situacio.

Ĉu mi menciuj, ke per Esperanto mi konatiĝis kun verkoj, kiuj por mi estus nealireblaj, malgraŭ mia plurlingveco? Aŭ ĉu mi menciuj, ke miaflanke, mi havigis al miaj samlingvanoj verkojn kiuj haveblis nur en la originala lingvo? Aŭ plie, ĉu mi menciuj ke mi parolas egale kun homoj kies lingvon mi ne parolas kaj kiuj ne parolas mialingve?

Ne necesas tion fari, ĉar ĉiuj esperantistoj certagrade spertis la samon. Sed kiom da ili devis forlasi sian landon kaj ekloĝi en nova, fremda lando? Tiuj ĉi, sendube, spertas la mondon malsame, pro sia esperantisteco. Ili povas pli bone klarigi, kion signifas paroli kun la

novaj samlandanoj en lingvo kiu neniel donas avantaĝon al la originaj landanoj.

Ankaŭ malavantaĝoj venas el tio. Kaj unu el ili estas certa izoligo ene de la esperanta mondo. Tion izoligon mi mem spertadas, sed mi ne povas plendi. Se oni ne estas esperantisto kaj/aŭ la ŝancoj komuniki pere de Esperanto estas maloftaj, oni integriĝas pli bone (supozeble) en la ĉirkaŭaĵo, kies lingvon oni lernas pli rapide, pli bone.

Kaj tamen, multe pli longa ŝajnas esti la integriĝo en la socio de la nova lando, ol la integriĝo en kiu ajn Esperanto-komunumo. Tion mi diras proprasperte. Kaj mi certas, ke mi ne estas unikaĵo.

Eble jam temp' estis por tiuj esperantistoj kiuj vivas (pro diversaj kialoj) ekster sia denaska lando fondi organizon, pere de kies bulteno informu la ceterajn samlingvanojn pri siaj spertoj. Mi certas ke ili estas interesaj.

Ionel Onet

(el *tejo-tutmonde*, jul-sep'94)



Esperanto Aplikata

Interŝanĝas uzitajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. J. Manuel Alonso de Arco, C.P. *Prácticas n-ro 1*, Rodríguez Rubí 1, E-29008 Malago, Hispanio.

Desegnojn kaj pentraĵojn verkitajn de ŝi mem vendas Ángeles Salazar Blázquez, c/ Rosa, Edif. Jaén, 1-2^o D, E-29010 Malago, Hispanio.

Esperanto en Poŝto kaj Telegrafo, José Matos de Castro, Poŝtkesto 980, E-18080 Granada, Hispanio.

Esperantistaj Radioamatoroj. Kontakto EB7 FOK. Poŝta adreso, José Matos de Castro, Poŝtkesto 980, E-18080 Granada, Hispanio.

Hostal' *La Hispanidad*, Explanada de la Estación, bl. 5, Malago, Hispanio. Tel. (95)2311135.

Interŝanĝas uzitajn hispanajn poŝtmarkojn kontraŭ aliaj uzitaj alilandaj. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Tradukoj el la franca kaj la kastilia en Esperanton. Andrés Martín, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Modoj, desegnoj, pentraĵoj. Skribu al Raquel Martín Tovar, Armengual

de la Mota 33, 4a D, 29007 Malago.

Survoje, dumonata revuo de UNIKO. Tre interesaj artikoloj de esperantistaj gravuloj. Vi povas komenci la abonon iam ajn. Peranto en Hispanio, Andrés Martín González, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Kosmo-Infano, sondisko de Solo. Prezo 800 pesetoj. AEU, poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Oficialaj tradukoj el la angla hispanlingven. J. F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago. Ankaŭ tradukas el la franca kaj germana en esperanton aŭ en la hispanan. Tradukoj prilaboritaj per komputilo kaj presitaj altkvalite.

Anoncu senpage en *Gazeto Andaluzia* vian komercan aŭ profesion agadon. Sendu al Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio, vian anoncon.

Parolu pri niaj senpagaj anoncoj al esperantistoj kaj neesperantistoj. Per tio vi helpos pliigi la prestiĝon de Esperanto kaj ties Movado. Ĉiutage kreskas la nombro de samideanoj kiuj gajnas monon per nia internacia lingvo.

Kiel verki Esperantlingvan tekston

per via vortlaborilo *WordPerfect 5.1* ĉi Helpe de *ZAMENHOF.WPK* vi povos entajpi iun ajn esperantlingvan tekston rapide kaj facile. La fajlo haveblas ĉe J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, E-29080 Malago, Hispanio. Prezo 750 pesetoj, plus sendokostoj.

Aperigu vian anonceton senpage sur ĉi tiuj paĝoj! Sendu ĝin al nia adreso, *Gazeto Andaluzia*, AEU, Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Ni ofertas produktojn de malpeza industrio: ŝraŭboj kaj ŝraŭbingoj, ekipaĵojn por produkti ŝraŭbojn kaj nuksojn, metal-pinglo-produktajn maŝinojn, lajtejajn ekipaĵojn, bakajn ekipaĵojn kaj multajn aliajn produktojn. Petu nian produktliston. Lamili & Nasrawe Export, 134 Brent Road, Southall, Middx, UB2 5LD, tel. kaj fakso 081 571 2246.

Kuracisto, fakulo pri prevento de malsanoj, proponas nutraĵojn sanigajn kiuj preventas malsanojn, stabiligas kontraŭ streso kaj plialtigas vivkvaliton. S-ro Prjahn Vladimir Petrovic, str. Kalinovskogo, 46-59, 20086 Belorusio, tel (8-0172)630-865.

Turismaj aranĝoj en Bulgario; transitaj servoj kaj hotelrezervado por Turkio kaj Grekio; enlanda kaj

internacia komerco. Angel Todorov, Stelo Tur, str. Ljuben Karavelov 68/III, BG-1000 Sofio; tel. kaj fakso: 359-2-66-28-97.

Oferto: purigĉaretoj (Eastmop), ĉiuspecaj glumarkoj, etiketoj k.s. Bartere: legomoj kaj fruktoj (po kamiono) kontraŭ ĉio ajn havebla sur la ĉeŝia merkato. Jindra Opršal, Loučna 74, CZ-78811, fakso +42-649-94206 (tra Brokeŝ).

PACOTUR bonvenigas al Ĉinio diversajn karavanojn kaj ankaŭ okupas pri ĉiuj privataj vojaĝdemandoj pri Ĉinio. Adreso: Chang Le Zhong Lu 21 Hao, CN-710032 Xi'an; tel. kaj fakso: +86-29-323-8859.

Perado por diversaj eksportadaj kompanioj en Xinjiang Ujgura Aŭtonoma Regiono. S-ro Liu Xiao she (Solis), XinJiang Tea & Animal By-prod. Corp., CN-830002 URUMQI, tel. +86(991)228799.

Eksporto de minaĵoj (smeraldoj, beriloj, turmalinoj, kvarcoj, jaspoj...) kaj agrikulturaĵoj (vaniloj, kafoj, kariofiloj, licioj...). Importo de elktraj motoroj, agrikulturaj maŝinoj, ladaĵoj, aŭtopecoj k.a. Esperanto Societo pri Minekspluatado, Lot IVB, 71 Ambohimiadana Sud Ambohimarantina, Antananarivo -101, tel. 302-05, fakso (261)2-312-01.

Transporto de ŝarĝoj kaj personoj en eksa SU kaj cetera Eŭropo. Eksporto de brodaj naciaj ĉemizoj, tuko k.s., diamantaj (sintezaj) instrumentoj, elektraj moviloj, lampoj, kompresoroj, agrikulturaj varoj. Importo de vestoj, ŝuoj, hejmaj kaj agrikulturaj maŝinoj, bicikloj, aŭtoj, traktoroj. Principe bartere (interŝanĝa) komerco. Ivan Lisenko, Firmao LIGAS, A/K-37, UA-314000 Poltava, Ukrainio; tel. 05322-21427.

Hua Xia Esplora Centro de Ekonomia kaj Kultura Evoluado volas havi kunlaboron kiun ĉiuj komercist(in)oj en la mondo. Kontakto: Fang Miao-qing, Hua Xia Research Center of Economic & Cultural Development, No. 62, Da Tang Xiang, Wu Lin Men, Hangzhou, Zhejiang, CN-310005.

Hu Renkui, fabrikestro, serĉas kunlaboroj por produkti fridujajn aparatojn. Bonvenas investado kaj modernaj ekipaĵoj. Adreso: Shenzhen Kaiguan Peijian chang, CN-315114 Ninghai, Zheijiang.

Lignaj produktoj: partetlignaj tabuloj, rezino de pino (i.a. por fabrikado de kolofonio kaj terebinto), aktivinta karbo. Komunaj investoj surbaze de nova leĝaro. Lic. Emilio Rodríguez Gómez, Mercado N^o 79, Apto. 24, ent. Arroyo y Santa María, Centro Habana, C.P. 10300 La Habana, Kubo.

Komercajn kontaktojn en Minsk kaj najbaraj urboj serĉas: Jan Pipen, str. Hazlaska 114, PL-43-400 Cieszyn, Pollando.


Firmao havas staplon kaj reton da butikoj: vendas variajn varojn, plejparte virinajn vestaĵojn. Kontaktoj kun firmaoj en Rusio, Ukrainio, Estonio kaj Ĉinio. S-ro Vjaĉeslavo Rusarev, ul. Akademika Skryabina, d. 20, kv. 210, RUS-109377 Moskva, hejma telefono 378-43-54.

Aĉeto de malnovaj aŭtoj por revendo en Togolando, S-ro Afantchao - Biakou Yao, B.P. 20225, Lomé, Togolando.

Ni vendas en Eŭropo mikσμαŝinojn por kemia sterko de la usona firmao *Ranco-Fertiservice*, kun komputerprogramo de la germana universitato Munkeno por konsili kamparanojn kaj optimigi la sterko-uzadon. Ni serĉas klientojn por tiuj produktoj (firmaoj kun grandaj magazenoj por vendado de kemia sterko) aŭ importistojn en Eŭropaj landoj. Raiffeisen Warenhandels GmbH, Schrobenhausener Str. 2, D-85302 Gerolsbach, Germanio. Tel 49-8445-1333, fakso +49-8445-1470.

Serĉas por kliento sistemon por la purigado de malgrandaj kvantoj (1000-5000 litroj po tago) de malpura akvo. Skribu al *Monda Merkato*, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, Germanio. Fakso +49/8809/1234.

2-a INTERNACIA KULTURA KAJ TURISMA SEMAJNO
sub aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo



15 - 22 okt. 1994

Adreso: ĉe Hispana Esperanta Fervojista Asocio
P.Kesto 15027, 08080 Barcelono, Katalunio
HISPANIO

REZOLUCIO DE UNESKO

8C/DR/116

La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto,

1 NOTAS la rezultojn atingitajn por Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

2 REKONAS, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de la UNESKO;

3 INSTRUKCIAS la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizojn;

4 NOTAS ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

4 KOMISIAS la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizojn.

(Akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko la 10an de decembro 1954, en Montevideo).

-----000000-----

N. de R. -

Nuntempe ERA kaj R.P. intencas kunordigi la politikan esperantistan agadon en la Naciaj Unesko-Komisionoj de la 172 Ŝtatoj membroj de la organizo.

La 300-taga agado de atentigado kaj informado farita de RP kaj de ERA en Italio, kune kun la Esperanto-manifestacio en Parizo dum la 27a Ĝenerala Konferenco, alportis al la prezento kaj sekva akcepto de la unua rezolucio de membro-ŝtato favore al la Internacia Lingvo. Fundamentaj estis la notoj subtenaj al la rezolucio, faritaj de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Federico Mayor.